

**PILO-PRESS**

Internacia

Informservo

N-ro 5/77 - 2 Feb 1977

Aperas ĉiusemajne

Ĉu vi jam sendis

vian salutanoncon

al Pilo-Press?

Faru tuj!

\*\*\*\*\*

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel

Postfach 2113

D-85 Nürnberg 1

Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

Eksplodo de lingvoĥaoso super la eŭropaj institucioj?

Bruselo (pp) - Laŭ letero de Eŭropa Esperanto Centro de la 12 januaro 1977 al Komisiono de la Eŭropaj Komunumoj rilate al la rezolucio de la Eŭropa Esperanto-Kongreso 1976 Eindhoven en la oficiala Gazeto de la Eŭropaj Komunumoj de la 27-a de septembro 1976 C 226/19 aperis mizprezento de tiu rezolucio. Oni skribis, ke la Esperanto-movado "malakceptas la lingvan diversecon pro principaj konsideroj."

En la letero de EEC al la Komisiono oni skribas, ke "la komisiona respondo klare baziĝas sur miskompreno, ĉar nek en la propono de la honorinda parlamentano, nek en la rezolucio troviĝas la frazo: 'malakceptas la lingvan diversecon pro principaj konsideroj'. Sufiĉas legi la tekston de la rezolucio por konstati ke ĉi tiu esprimo ne estas uzita kaj ankaŭ ne celita.

La nomita esprimo subtaksas la meritojn de Esperanto kaj el ĝi montriĝas nescio pri la celoj de la Esperanto-movado, kiu certe respektas la kulturalan riĉecon de la lingva diverseco kaj nur volas protekti tiun riĉecon kontraŭ superrego de kelkaj lingvoj. Ĝi volas eviti lingvan diskriminacion kaj postulas samajn rajtojn por ĉiu eŭropa lingvo....."

Reago de parlamentano C. Laban

EEC sendis kopion de sia letero al la Komisiono ankaŭ al la nederlanda parlamentano C. Laban, kiu jam kelkfoje intervenis ĉe la Komisiono favore al Esperanto. Ĉi-sekve ni publikigas la tradukon de lia responda letero de la 20-a de januaro 1977 al EEC:

"Multan dankon pro via letero de 12-a de januaro '77. Kun Intereso mi ekkonis vian leteron de la sama dato al Eŭropa Komisiono. Malfacile vi povus fari ion alian ol substreki tiajn samajn argumentojn. La rezulto estas por vi kaj por mi kiu faris la demandojn ne tre instiga. Restas nenio ol daŭre strebi al pli da kompreno. Mi timas ke unue devos eksplodi la lingvoĥaoso super niaj institucioj.

Oni nun havas la pensad-turniĝon limigi la nombron de oficialaj lingvoj ĝis la modernaj (franca-angla-germana). Ĉi tio certe malsukcesos pro kontraŭstaroj de la membroj-ŝtatoj, kies reprezentantoj tiam ne plu havos eblecojn precize formuli kion ili volas diri.

Vi certe konas la kvereladon pri la eŭropaj pasportoj, tio estas mia opinie nur komenco.

Rilate al via demando pri publikado de via letero mi bedaŭre devas diri al vi ke mankas al mi eblecoj por tio."

Ŝtelistoj ne ŝatas Esperantaĵojn

Bolonjo (pp) - La 8-an de decembro 1976 ŝtelistoj vizitis la sidejon de la Bolonja Esperanto-Grupo. Ili forprenis filmprojekciilon, kaŭzis teruran malordon, sed...neglektis Esperantaĵojn. Verŝajne oni povos paroli pri enradikiĝo de Esperanto, kiam ŝtelistoj forprenos Esperantaĵojn kaj neglektos...filmprojekciilojn, komentis Radio Roma.

\*\*\*\*\*

Pilo-Press, ĉiusemajna informservo, jara kotizo 30,-- GM. Bonvolu pagi al Ludwig Pickel, D-8500 Nürnberg, Poŝtĉekkonto Nürnberg 81956-851

Esperanto-okazaĵoj 1977 en Japanujo

Tokio (pp/ks) - Ĉi-sekve ni publikigas informojn pri Esperanto-aranĝoj 1977 en Japanujo, kiuj eventuale estas interesaj por personoj, kiuj planas vojaĝon al Japanujo.

La cititaj aranĝoj ne estas ĉiuj renkontiĝoj okazontaj dum 1977 en Japanujo. Okazos krome multaj malpli grandaj, pri kiuj jam nun ekscii detalojn ne jam eblas. La listigitajn renkontiĝojn organizas diversaj organizaĵoj, sed oni povas peti detalojn, informojn kaj kontaktigon kun la organizantoj de

Esperanto-Domo, Sone-build.502, 46-17 Yoyogi-3-tyōme, Sibuya-ku Tōkyō - to 151, Japanujo.

Februaro: Ski-kunloĝado en la fama skiejo Zao ĉe Yamagata, de vendredo, la 18-a ĝis dimanĉo la 20-a

Aprilo: 51-a Kongreso de Esperantistoj en Kjuŝu, ie sur la insulo Kjuŝu (distrikta kongreso)

Majo: Tutlanda kunloĝado de esperantistoj, de sabato 30-a de aprilo ĝis mardo 3-a de majo, en Yaizu, provinco Sizuoka, 100 - 150 partoprenantoj

25-a Kongreso de esperantistoj en Kansajo, dum semajnfino fine de la monato en Ikeda/Oosaka

26-a Kongreso de esperantistoj en Tōkai (t.e. la regiono ĉirkaŭ Nagoya), semajfine meze de majo, loko fiksota (distrikta kongreso)

Junio: 26-a Kantoa Kongreso de Esperanto, semajnfine meze de junio, eble en Tokio (distrikta kongreso)

Julio: 4-a Internacia Esperanto-Renkontiĝo, dum la semajnfino 15/17-a aŭ 22/22-a de julio en Tokio  
Diskutado kaj amuziĝo kun eksterlandanaj gastoj. Kiu vizitos je tiu tempo Japanujon havas preskaŭ la moralan devon esti gasto de tiu renkontiĝo senkrokodila.

41-a Kongreso de Esperantistoj en Hokkaidō, dum semajnfino fine de julio, eble en Sapporo (distrikta kongreso)

Aŭgusto: 9-a Friska lernejo de Esperanto, meze de la monato, ie en Kansajo, t.e. regiono inter Kioto kaj Oosaka, 100-120 partoprenantoj

64-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj, de sabato 27-a ĝis 28-a de aŭgusto en Tokio, 500 - 700 partoprenantoj, landa kongreso.

Septembro aŭ oktobro: Esperanto-paradizo ie en Kjuŝu, la suda ĉefa insulo de Japanujo, samtempe kun:

Aŭtuna kunloĝadeto en Kitami, Hokkaidō, la plej norda ĉefa insulo de Japanujo

Novembro: 18-a Tohokua Kongreso de Esperanto, meze de la monato semajnfine ie en Tōhoku, t.e. regiono ĉirkaŭ Sendai

Decembro: Zamenhof-festoj en diversaj lokoj

\*\*\*\*\*

Amika Socio de la Popolo de Saharo

Las Palmas (pp) - Amika Socio de la Popolo de Saharo, Apartado 940, Las Palmas, Canarias, Hispanujo, volas helpi al "senkulpa popolo de Saharo." Helpemuloj kiuj volas ekscii pri la problemo skribu al la supra adreso! Amika Societo de la Popolo de Saharo opinias, ke la Popolo de Saharo "nun suferas similan dramon kiel antaŭe Vietnamio."

## Rezolucio de "La Patrolo"

Kassel (pp) - La Literatura Rondo "La Patrolo", dum sia ordinara kunsido en Jugendburg Sensenstein (Nieste/Kassel, F R Germanujo) la 29-an de decembro 1976,

konstatinte, ke ĝi sukcesis viviĝi nun internaciskalan literaturan revuon en Esperanto, tamen

rimarkas la mankon de aktuala didaktika materialo por itallingvanoj, substrekas la mankon de reprezentaj verkoj el la itala literaturo en Esperanto, kaj la preskaŭ absolutan nekonon pri la Esperanta kulturo en itallingvaj teritorioj;

denuncas ke gravaj manuskriptoj de Esperantaj beletristoj apartenantaj al la itallingva kulturo riskas definitive perdiĝi pro nesufiĉa interesiĝo flanke de la esperantistoj mem;

decidas, ke la rondo dediĉos siajn energiojn al la almenaŭ parta nuligo de tiuj mankoj kaj

alvokas ĉiujn kompetentajn kaj aktivajn fortojn, tuj starigi/kun unu el la redakcejoj de "Literatura Foiro", por ke oni ellaboru komunan planon cele al la aperigo de la didaktikaj, sciencaj kaj beletraj verkoj.

## Adresoj de "Literatura Foiro"

Norda Redakcejo: P.L. 125, SF-74101 IISALMI

Suda Redakcejo: Via Pantano, 17, I-20122 MILANO

Okcidenta Redakcejo: b.p. 771, CH-2301 La CHAUX-DE-FONDS

\*\*\*\*\*

## Forumo

### Pri iu deklaro

En "Paris Esperanto", n-ro 1/1977, organo de Centre Culturel d'Esperanto de Paris, aperis jena kontribuo:

"En recenzo de la Libro 'Honore al ili' Renato Corsetti diris:

'Mia revo pri Esperanto-movado bildigas antaŭ miaj okuloj movadon kiu en ĉiu lando, en ĉiu situacio estas aliancano de la progresemaj fortoj de tiu lando kaj situacio. Se ni ne kapablos alveni al tiu situacio, ĉio estos vana, kaj ni malvenkos kiel malvenkas je longa tempo ĉiuj malprogresemaj fortoj' (el 'Pilo-Press 10-an nov.76)

Tia deklaro implicas multe da demandoj. Pri kiu Esperanto-movado temas tie?

Kiuj, laŭ la aŭtoro, estas progresemuloj kaj malprogresemuloj?

Ĉu temas, en lia penso, pri politikaj tendencoj, dogmoj...?

Ĉu alianco kun apartaj konceptoj, kiuj ajn ili estas, ne kondukos dro-nigi Esperanton kune kun la aliancano, kiam tiu lasta estos forĵetita el la socia sceno?

Tial ni konservu niajn principojn:

Esperanto estas universala lingvo. Kiel lingvo ĝi estas ĉieluzata ilo. Kiel universala ĝi apartenu al ĉiuj. Do: Ĉiu rajtas ĝin uzi por es-primi siajn ideojn. (Do sin organizi) Almenaŭ ĝis kiam Esperanto estos 'formale agnoskita de la plej multaj instancoj', nepre necesas kaj necesos organizo strikte nepre nure poresperanta.

Ĝis nun U.E.A. asertas esti tia. Ni deziras, ke UEA daŭru tiel, strik-te neŭtrala. Ĝi havas sian nepre necesan laboron sur la lingva kampo.

R. Doury"

\*\*\*\*\*

Praktiku Esperanton! Aŭskultu al la Esperanto-elsendoj!

Skribu regule al la redakcioj de tiuj elsendoj!

## Esperanto en la Radio

IBRA Radio estis bonege aŭdebla, marde la 1-an de februaro, je la 21,30 horo, sur ondo 48,62 m (6 170 khc). Krom parolado estis aŭdebla ankaŭ kanto en Esperanto.

Vatikana Radio same bone kiel en la antaŭaj dimanĉoj estis aŭskultebla. El la leterkesto oni eksciis, ke Radio Vatikana pasintjare ricevis 800 korespondaĵojn el ĉ. 30 landoj de esperantistoj. - Cetere, ĵus alvenis la belaspekta programkajero, n-ro 2/77 (februaro) kiu ennavas tutan paĝon kun Esperanto-teksto. El ĉi ni ekscias, ke "sub la direkto de la Centra Redaktejo kunlaboras en la programo la Roma grupo de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista."

Pekino regule elsendas en Esperanto je la fiksitaj tempoj. Pri la kaŭzoj, kial la revuo "El Popola Ĉinio" ekde la novembra numero 1976 ne plu aperis, nenio estas konata krom la informo, ke n-roj 11+12/76 aperos kiel duobla numero post la januara numero 1977. Sed ĝis nun ne jam aperis la januara numero.

Svisa Kurtonda Servo. D-ro A. Baur parolis pri la ekonomia situacio nuna de Svislando. En unu el la pasintaj elsendoj d-ro Baur parolis pri la rilatoj de la aŭskultantoj kun la radio-stacio kaj opiniis, ke estus oportune, ke la Esperanto-aŭskultantoj skribu en nacia lingvo al la stacio. Kontraŭe al tiu rekomendo, en la pasinta elsendo de Radio Vatikana oni petis la aŭskultantojn skribi al Radio Vatikana en Esperanto.

Romo. La Esperanto-redakcio de Radio Roma dum 1976 ricevis en-tute 1218 korespondaĵojn, inter ili 647 leterojn aŭ kartojn kaj 591 presajojn. Laŭlande: F R Germanujo 275, Italujo 135, Francujo 123, Nederlando 101, Pollando 76, Hungarujo 54, Britujo 42, Hispanujo 40, Danlando kaj Svislando po 37, Aŭstrujo 35, Germana Demokratia Respubliko 33, Svedujo 30, Finnlando, Ĉeĥoslovakio, Sovetunio po 23, Belgio 19, Ĉinio kaj Greklando po 18, Norvegio 17, Japanujo 16, Bulgario 13, Jugoslavio 11, Brazilo 9, Portugalio 7, Kanado 6, Kolombio, Sudafriko po 4, Usono 3, San Marino, Argentino, Israelo po 2, Rumanujo, Zairio po 1. - La redakcio dum 1976 forsendis 2 615 korespondaĵojn.

ORF Vieno. Kiel ni jam informis, el Aŭstrio nun estas aŭdeblaj du diversaj Esperanto-elsendoj: Sabate/dimanĉe la 10-minuta elsendo sur mallonga ondo kaj ĵaŭde, je la 18,50 h, sur ultrakurtondo 89,9 m kaj sur mezondo 203,4 metroj la 5-minutaj Esperanto-informoj. La elsendo sur mezondo estas bonege kaptbla ĉi tie en Nürnberg, kiel ni povis konstati pasintan ĵaŭdon. Rilate la mallongondanelsendon la redakcio informas, ke aŭskultantoj, kiuj plendas pro malbona ricevebleco provu aŭskulti sabate sur ondo 19,86 m kaj dimanĉe, sur ondo 16,82 m.

Varsovio. Kadre de la "Semajno en Pollando" kaj la rubriko "El la temoj de la semajno" Pola Radio raportis pri inaŭguro de parto de la Reĝa Kastelo, temas pri 36 salonoj. Lige kun tiu evento la redakcio memorigis ankaŭ pri la kontribuo de esperantistoj por la rekonstruo de la Reĝa Kastelo, i.a. pri la Pilo-Press-Kampanjo. En la Esperanto-Ekspreso oni povis aŭdi du intervjuojn: S-ro Niderfrieniger el Budapeŝto raportis pri la pasinta Vintra Feriado en la hungara ĉefurbo kaj s-ro J. Uspienski intervjuis Esperanto-agantinon el Gdansko pri la tiea Esperanto-agado. \*\*\*\*\*

Post enkonduko de regulaj Esperanto-elsendoj ĉe Radio Vatikana eble povus ekesti la impresoj, ke la situacio de Esperanto en la radia medio estas estas firma kaj sekura. Sed la pozicion Esperanto nur tenos, se la esperantistoj vere aktivu sur tiu kampo, t.e. se ili aŭskultas kaj regule skribas al la stacioj. Speciale tio gravas por Varsovio, kiu **havas** unikan pozicion inter la Esperanto-elsendoj. Do mi rekomendas aŭskultu kaj skribu!